

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2008:3



Sveda Esperanto-Kongreso en Gotenburgo

En tiu ĉi numero de La Espero vi povos legi raporton pri la sveda Esperanto-kongreso en Gotenburgo. La kongreso certe estis same bunta, kiel vi povas vidi sur la bildoj tie ĉi maldekstre.

Kongreso estas ebleco ekskursi. Ĉi-foje la ekskurso okazis en la Botanika ĝardeno de Gotenburgo.

Alia grava ingredienco en Esperanto-kongreso estas kulturaj aranĝoj. Kanti estas grave. Ĉiu movado, kiu kantas, havas veran vivon.

Tria parto de la kongreso estis prelegoj. En tiu ĉi numero de La Espero vi povos plulegi pri la kongreso sur paĝo 2.

Grandan dankon al ĉiuj, kiuj helpis aranĝi sukcesan Svedan Esperanto-Kongreson en Gotenburgo.

Fotis: Torben Svedssen



100 jaroj
universala
esperanto-
asocio

UEA 100 år

Världsesperantoförbundet fyller 100 år i år. Läs den indiske ordföranden Probal Dasguptas hälsning på sidan 5.

Universala Esperanto-Asocio centjarigas en tiu ĉi jaro. Legu la saluton de la hinda prezidanto Probal Dasgupta sur paĝo 5.



Olimpiaj ludoj

En 2008 estos Olimpiaj ludoj. Lernu la nomojn de diversaj sportoj en Esperanto en La Espero. Vidu paĝon 8.

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Majo 2008 • 96-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: esperanto@glocalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2008: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2008:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 031 - 12 05 94.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsträsk 11

961 76 Boden, tel. 0921-123 54

e-post: esperanto@glocalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Erik Nisshagen



/skvaŝon (squash), volanludon/
badmintonon aŭ kuras.

Ĉu vi havas familion?

Mi havas patron, patrino kaj fratino.

De kiam vi interesigas pri Esperanto?

Kiam mi studis en la gimnazio en Lerum tie estis tre bona instruisto Folke Wedlin, kiu tre fervore propagandis ke ni studu Esperanton. Li ankaŭ bone instruis. Do, li estas la kialo.

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Ne ĝis nun, sed eble mi havos en la estonteco. Tio ĉi estas mia unua kongreso.

Kie vi naskiĝis?

En Gotenburgo antaŭ 20 jaroj.

Kie vi logas?

En Lerum.

Pri kio vi laboras?

Mi studas juron en la Komerca akademio, kiu estas parto de la Gotenburga universitato. Estonte mi eble volas labori pri internaciaj aferoj. Mi ne havas konkretajn planojn.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Mi fakte ne havas tempon por aliaj intereso. La studoj postulas tiom multe da tempo. Se mi havas liberan tempon mi ludas kvarmurdilikon

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

Mi malmulte legis en Esperanto. Mi tamen povas menci la lernolibron "Esperanto por gimnazianoj" kaj "Homaj rajtoj - demandoj kaj respondoj".

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Mi ne scias.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

Estimataj amikoj!

Estas tempo por nova La Espero. Tiun ĉi fojon La Espero ne estas tute la sama kiel antaŭe. Ni komencis uzi alian komputilan programon por ke estu pli facile fari La Esperon. Kun la nova komputila programo pluraj redaktoroj povos kunlabori pri la revuo.

Bedaŭrinde ĉiam estas problemoj kiam oni transiras al nova sistemo. Ni klopodis daŭre uzi la belajn litertipojn, kiujn kreis Franko Luin. Nun mi skribas per la litertipo Devin. Aliloke en la revuo estas ankaŭ la litertipo Norma.

Se vi trovos ke estas iuj malavantaĝoj pri la nova aspekto de La Espero, ne hezitu kontakti nin.

Hodiaŭ estas la mezo de majo kaj - kvankam iom neĝas tie ĉi en Boden - la somero estas survoje. En tiu ĉi numero de La Espero mi donis ekzemplojn pri okazaĵoj por Esperantoj en Svedio kaj en la proksimeco dum la somero.

Mi esperas ke vi ĉiuj havos bonan someron!

Leif Nordenstorm
Redaktoro de La Espero

Kvardekelk esperantistoj en printempa Gotenburgo

Kvardekelk esperantistoj renkontiĝis en printempe bela Gotenburgo por Sveda Esperanto-Kongreso 2-4 de Majo 2008.

Jam vespere la 1an de Majo renkontiĝis la estraro de SEF por diskuti, sed la kongreso mem komenciĝis nur vendrede la 2-an per ekskurso al la riparata Esperanto-Placo kaj al la Botinika ĝardeno, kie ni ricevis bonan gvidadon tra la diverskontinentaj sekcioj de la ĝardeno.

La kongreso okazis en Masthuggets hus, proksime al la ejo de la Gotenbarga Esperanto-klubo kaj Eldona Societo Esperanto.


Tiu parto de Gotenburgo estas monteta. Apud la proksima Mastguggskyrkan eblas havi belan panoramon.

Jarkunvenoj

La kongreso ankaŭ estas loko por jarkunvenoj. Sabate kunvenis la sveda sekcio de kristana KELI kaj Eldona Societo Esperanto. Dimanĉe jarkunvenis Sveda Esperanto-Federacio kaj la instruista ILEI-se.

Prilingvaj prelegoj

La invita Heidi Goes el Belgio prelegis pri la temo de sia esplorado: "La historio de la Esperanto-movadoj en Afriko kaj en Indonezio". Pri la movado en Afriko ŝi verkis la libron "Afero de Espero". Vidu la recenzon sur p. 8 de tiu ĉi numero de La Espero.



La dua prelego de Heidi Goes pri Esperanto en Indonezio. Fotis: Wim Posthuma.

Aliaj interesaj prelegoj okazis dimanĉe kiam Folke Wedlin: prelegis pri "Lingvoj lerneje". Li havas multjaran sperton pri lingvoinstruado pri i.a. la itala kaj Esperanto en gimnazio en Lerum. Li povas konstati ke multaj gejunuloj vere interesiĝas pri

fremdaj lingvoj, sed ne estas pretaj uzi la tempon, kiun oni vere bezonas por ellerni lingvon. Dimanĉe prelegis Kaarlo Voionmaa pri "La finna kiel sveda lingvo. Spuroj de komuna historio". La finna ja ne estas parenca al la sveda, sed en ĝi troviĝas multaj pruntitaj vortoj. Svedio kaj Finnlando havas grandparte komunan historion. Tial ankaŭ la lingvoj similigiĝis.



Partoprenantoj de la kongreso.

Geamika kunestado

Vespere estis geamika kunestado, kantado kaj tirharmonika muziko kun la akordionisto Lena Strand.



Dum la sabata tagmango gitarludis kaj kantis svede, hispane kaj Esperanto Nelo Castillo. Violonis Agneta Järnlström. Okazis distra aŭkcio, dum kiu eblis aĉeti librojn kaj aliajn objektojn.

Dimanĉe okazis Esperantlingva diservo en Masthuggskyrkan. Pianludis Mats Landfors kaj violonis denove Agneta Järnlström. Oni kantis el la ekumena kant- kaj preĝlibro Adoru.

En la kongreso oni ankaŭ povis aĉeti novan tason kun vortvezikon kun la vorto "Esperanto". La ĉeestantoj estis petitaj pagi por du sed preni nur unu por ke SEF povu doni nombron da tasoj al Språkkaféet en Esperanto-Placo en Gotenburgo.

Leif Nordenstorm

Elektitaj en Gotenburgo

La estraro de Sveda Esperanto-Federacio

Bengt Olof Åradsson prezidanto, ekonomio;
Bengt Nordlöf, vicprezidanto, la lingva tago;
Ann-Louise Åkerlund; sekretario, ekonomio;
Wim Posthuma, estrarano;
Olof Pettersson, estrarano; kunredaktoro de La Espero; la lingva tago;
Roland Lindblom, anstataŭanto;
Leif Nordenstorm, anstataŭanto, redaktoro de La Espero.

Taskoj ekster la estraro de SEF
Anita Dagmarsdotter, kontumado;
Kaisa Hansen, membroregistro, kunordiganto, ĝemelaj urboj

La estraro de sveda Sekcio de KELI

Mats Landfors, prezidanto;
Agneta Järnlström, sekretario
Bengt-Olof Åradsson, kasisto;
Leif Nordenstorm, anstataŭanto

La estraro de Eldona Societo Esperanto

Leif Nordenstorm, prezidanto;
Joakim Erwall, sekretario;
Anita Dagmarsdotter, kasisto;
Andreas Nordström, anstataŭanto;
Bo Sandelin, anstataŭanto

La estaro de ILEI-se

Agneta Emanuelsson, sekciestro,
Fredrik Olofsson, estrarano;
Inga Johansson, estrarano;
Bo Hedberg, estrarano;
Sten Svenonius, estrarano;
Ralf Jalming, anstataŭanto;
Carl Mäsak, anstataŭanto.

Elektita aliloke: la estraro de SEJU

Carl Mäsak, prezidanto;
Magnus Henoĉ;
Johan Krig Ölund;
Robin Rönnlund.

**RONDO LAN-
GLET 2007**

Stort tack till medlemmarna i Rondo Langlet som har gett SEF en månadsinkomst på 2430 kr i månaden för okt-nov-dec.

Melita Dörr
Ingrid Göransson
Signhild Johansson
Leif Nordenstorm
E Leif Pettersson
Johan Selme
Bertil Öjerskog
Lennart Sundman
Aino Åberg
Haldo Vedin
Gunnar Olsson
Sten Hannerz
Sven Linnér
Göran Lundgren
Marianne Westman
Åke Waller
Kaisa Hansen
Ole Hansen
Anders Sundman

**150 ord espe-
ranto i Fönstret**

ABF:s tidning "Fönstret" nr 2, 2008, presenterar esperanto i 150 ord under "Bildningsakuten", med en kort text och ett smakprov.

**Hedersmed-
lemmar i Väsby**

Esperanto i Väsby sänder La Espero och Språket Esperanto och bifogar brev våra hedersmedlemmarna Jean Amouroux i Frankrike, Odd Tangerud i Norge och Louis C Zaleski-Zamenhof i Frankrike.

Hur många esperantoklubbar har hedersmedlemmar? Skriv till La Espero och berätta.

**Esperantoför-
fattare på sven-
ska**

Esperantoförfattaren Sten Johansson har gett ut sin novellsamling "Tuppaskinn" som stycketrycksbok på www.vulkan.se Den innehåller 16 noveller och är på 144 sidor.

**24 membroj en
Skövde**

Skövde Esperantoklubb, kiu nun havas 24 membrojn, dum sia jarkunveno povis konstati ke la klubo havis viglan jaron kun multaj variaj renkontigoj.

Granda gazeta atento estis pro la partoprenado en junulara libertempa arang "Yourspace". Fakte Esperanto tiris la plej grandan intereson inter la junaj partoprenantoj. SEJU-anoj Carl Mäsak kaj Magnus henoĥ helpis al la sukceso. Klubprezidanto Karl-Gustaf Gustafsson en Interreto gvidis "distanca" kurson kun 35 lernantoj el la tuta mondo: kvin el Usono, Kanado kaj Anglujo ricevis diplomon.

Solveig Bertilsson kaj Carl-Erik Ohlsson faris grandan laboron por SEF per presado kaj distribuado de La Espero.

En la propra klubejo la klubo havas grandan bibliotekon, prizorgitan de Hilgon Frisk. Ŝi ankaŭ gvidis literatur- kaj lingvokurson kun ses partoprenantoj.

La tuta estraro estis reelektita. Carl-Gustaf Gustafsson do restas prezidanto kaj Kurt Frisk vicprezidanto.

Börje Andersson

**Studrondo en
Västervik**

Västerviks-Tidningen raportis pri studrondo pri Esperanto ĉe Vuxenskolan. Gvidis ĝin Hans Hök.

Aparte interesa estas ke Hans Hök mem mendis la komencantulan pakajon ĉe EsperantoCentro en Stokholmo en junio 2007. Aŭtune li partoprenis la universitatan kurson pri Esperanto en la Stokholma universitato kaj tiun ĉi printempon li mem instruas la lingvon.

**Eniro och Mir-
inda**

Ordet Eniro är esperanto och betyder ingång. Eniro är också ett privatägt svenskt katalog- och söktjänstbolag som grundades 2000 genom en avknoppning av Telias tjänster för telefonkataloger och nummerupplysning. Denna verksamheten hade tidigare skötts av enheten Telia Infomedia Reklam AB och redan i början av 90-talet hade man tagit sig in på telefonkatalogsmarknaden i ett flertal europeiska länder. Främst i Ryssland och övriga Östeuropa.

Det är naturligtvis trevligt att Eniro har sitt namn på esperanto. Ett annat varumärke som är esperanto är läskan "Mirinda" som tillverkas av Pepsi i Tyskland. Mirinda betyder underbar.

**Esperantoför-
laget 90 år**

Esperantoförlaget ger ut böcker på och om esperanto. Här hittar man såväl läroböcker som ordböcker, grammatik och skönlitteratur skriven av svenska författare på esperanto, likaså svensk skönlitteratur i översättning till esperanto.

Sten Johansson är en av de produktiva nutida författarna på esperanto. Hans böcker har även kommit ut på förlag i andra länder. Böcker från andra förlag kan beställas från Esperantoförbundet eller från det internationella förbundet UEA.

Esperantoförlaget är en ekonomisk förening, men arbetet bedrivs helt ideellt. Förlaget har gett ut böcker sedan 1918. På esperanto heter det Eldona Societo Esperanto. På Esperantoförlagets hemsida kan du beställa böcker via en beställningslista. Det går också bra att ringa, antingen till Esperantoförlaget eller till Esperantoförbundet.

**LASTA NOVAĴO
Tertremo en
Ĉinio**

En la 12-a de majo okazis 8.0-grada tertremo en Wenchuan, gubernio de ĉina provinco Sichuan. Pekino, Sanhajo, Gansu, Shanxi, Shaanxi kaj aliaj lokoj sentis la tertremon, ankaŭ Vjetnamio kaj Tajlando diversgrade sentis la tertremon. Ĝis la 18-a de majo, la tertremo kausis morton de pli ol 32477 homoj, inter la mortintoj pli multaj estas infanoj, maljunuloj kaj gelernantoj, kiuj estis en klasĉambro dum la okazo de tertremo. La domoj, vojoj, lernejoj, hospitaloj, fabrikoj ktp. estas detruitaj. Jam pasis pli ol 6 tagoj post la okazo de tertremo, multaj tertremaj regionoj estas en montaro, sencesa pluvo, malvarmo, malsato, malsano, daŭra tertremo suferigas la popolanojn en regiono trafita de tertremo. Pli ol kalkulitaj 50000 homoj ankoraŭ estas sub la detruitaj konstruaĵoj. Oni povas antaŭvidi, ke eblos 100000 popolanoj mortos pro la katastrofo.

Ni, esperantistoj, deziras konstrui unu lernejon "Espero" en regiono trafita de tertremo, helpi esperantistkaj viktimmilianojn, ankaŭ viaj kontribuoj estas bonvenaj.

Petu informojn de: tertrema@yahoo.cn.

Ni transdonos viajn profundan simpatian kaj sinceran konsolon al esperantistoj, viktimmilianoj kaj registaroj de trafita regiono de tertremo.

Wang Xigeng



En la Societo pri la Internacia kaj Interkultura Interŝanĝo ANA-VOJ la Bialistoka E-Societo anoncis la pretecon akcepti por unu jaro volontulon el la eŭropunia lando Kadre de la Eŭropa Volontulado, la Programo „Junularo en la Aktivado" Kamanjo 2. Esperantlingva volontulo kune kun la membroj de la Societo laboros pri la popularigado de E-ideo:

respektado de la kultura varieco en la kunligo kun la kontraŭbatalado de rasismo kaj ksenofobio. Kiel atentigis BES en sia anoncodeklaro kono de Esperanto grandigos la ŝancojn de volontulo por efika agado. Pli da informoj eblas ricevi ĉe la kontaktofonon:

telefono/fakso: 48.85.717
91 45, poŝtelefonoj: +48 506 565 438 kaj +48 510 502 826, elektronike: anawoj@anawoj.org

Oficiala retpaĝo pri la projekto: http://ec.europa.eu/youth/evs/aod/hei_form_en.cfm?EID=58000396510 (en la angla)

Kandidatiŝoj alveni prefere ĝis jaŭdo, la 22-a de majo 2008.

(Tiu ĉi novaĵo venis al La Espero nur lunde la 19-an de majo 2008. *ndlr*)

Eĥoŝanĝo ĉiujaŭda

Så heter Sveriges esperantisters ungdomsförbunds organ på Internet: <http://tejo.org/seju/escj/2008-19.html>

Apelsinträff

Vi är mycket glada att för andra året i rad kunna presentera Härnösands mest lysande esperantoarrangemang, anordnad av Härnösands esperantoklubb och SEJU. Mellan den 5:e och 7:e september träffas vi i år, och har minst lika roligt som förra året!

Temat "Ut-och-in" handlar om skillnaden mellan utsidan och insidan på esperantovärlden. Inuti har vi det varmt och skönt; vi skvalpar runt, ombonade av fruktkött som små kärnor i en mogen apelsin. Utanför är det inte lika ombonat; man känner knappt till vad fruktkött är för något, och det finns ett tjockt skal mellan de två världarna. Kan man göra något åt det, tro?

La Perdita Generacio spelar, det finns kanoter, värmande bastu och möjlighet att tillsammans med kompetenta guider bli uppäten i skogen.

En nybörjarkurs kommer att hållas på lördagen, för folk som just har börjat nosa på språket och är nyfikna på att veta mer. Gamla rävar är också välkomna, och kan då spela en mer stöttande roll i övningarna.

Buckytournering! Förstås. Härnösand ligger på Sveriges östkust, 40 mil norr om Stockholm, 20 mil sydväst om Umeå, och 40 mil öster om Trondheim.

Vi ser gärna att ni betalar en bogningskostnad om 100 SEK. Kostnaden för dem som hinner in med bogningskostnaden innan 5 augusti är bara 100 SEK, alltså totalt 200 SEK. För övriga deltagare är kostnaden totalt 275 SEK. Sista anmälningsdag är 25 augusti.

<http://tejo.org/seju/orangha-renkontigho-2008/>



IJK 2009 en Liberec'

Internacia Junulara Kongreso en la 2009-a jaro okazos en la Ĉeĥa urbo Liberec' – tian decidon de la TEJO-Estrararo anoncis merkrede vespere Vildana Delalic, estrarano por kongresoj.

La kongreson organizos ne unu, kiel kutime, sed tri Landaj Sekcioj. Temas pri la Ĉeĥa, Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj, ĉar Liberec' situas en la regiono, kie kunigas landlimoj de tiuj tri landoj.

Nomo de la urbo rolos ankaŭ kiel temo de la 65-a IJK kaj ĝin la organiza teamo intencas pritrakti diversflanke. Komencante de tradiciaj liberecoj formigantaj ekde apero de la homa civilizo, kiel ekonomia, religia, aŭ pli vaste spirita liberecoj, trabsirante al demokratio, kiun formas ekzemple persona libereco aŭ libereco en ĵurnalismo kaj finante per relative novaj aspektoj de libereco, kiuj sekvas modernigon de la "globa vilaĝo". Kaj temas ekzemple pri konfronto de kopirajtoj kun libereco en programara mondo.

Dum la kongreso okazos ankaŭ diversaj ekskursoj, interalie al la ĉeĥa ĉefurbo Prago. Apartan atenton valoras doni al la fakto, ke IJK ankoraŭ neniam okazis en Ĉeĥio.

La junulara kongreso okazos inter la 18-a kaj 25-a de julio 2009, do rekte antaŭ la Universala Kongreso en Bjalistoko.

TEJO serĉas volontulon!

TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo.

TEJO-volontulo devas preti labori dum 12-18 monatoj kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Julia Noe finiĝos, do ekde la 1a de novembro 2008. La limdato por kandidatiĝi estas la 15a de septembro 2008.

Pliajn informojn en la retpaĝo de TEJO: www.tejo.org/node/49

H eller x?

I esperantos begynnelse hade tryckerier inte alltid tillgång till blytyper med de övertecknade bokstäverna som används i esperanto, alltså ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ och ŭ. Som en lösning på detta finns i *Fundamento de Esperanto* anmärkningen att tryckerier som inte har tillgång till de bokstäverna istället kan använda ch, gh, hh, jh, sh och u. Även om detta nog inte utgör något stort problem för tryckerier idag, kan de övertecknade bokstäverna ändå ställa till problem.

När man skriver e-post, chattar eller på annat sätt överför text mellan datorer, kan man inte vara helt säker på att alla tecken – särskilt inte "esperantobokstäver" – kan visas på rätt sätt på mottagarsidan. I sådana sammanhang kan det vara klokt att använda just h-metoden. En annan ganska spridd variant är den så kallade x-metoden, alltså att istället skriva cx för ĉ, gx för ĝ och så vidare. Eftersom bokstaven x inte ingår i esperantos alfabet (även om tecknet i sig så klart existerar, till exempel i matematiska formler, och då utläses *ikso*) har x-metoden dels fördelen att orden kan sorteras alfabetiskt av datorer (eftersom bokstäverna med övertecken kommer efter sina motsvarigheter utan övertecken i esperantos alfabetet), dels att det då går enklare att på automatisk väg göra om texten till bokstäver med övertecken, eftersom risken för förväxling är betydligt lägre.

Ska man hålla sig till Fundamentet, är dock h-metoden att föredra: Esperantoakademien har vid åtminstone två tillfällen, 1982 och 2007, tagit ställning till vilken variant som är att rekommendera vid avsaknad av typsnitt med rätt övertecken, och i bägge fallen hållit fast vid h-metoden. X-metoden är ändå så pass spridd och vedertagen att man nog i de flesta fall kan välja den man är mest bekväm med att läsa och skriva själv: även på Akademiens sidor finns valmöjligheten att få texten visad antingen med rätt övertecken, eller med x- eller h-metoden.

Olof Pettersson



DEZIRAS KORE-
SPONDI

83-jara pensiulino en Litovio: Visiniauskiene, V Dainavos g. 7, Islauzas, LT-59303 Prienu r., Litovio.

TRA LA MONDO

Mezorienta
renkontiĝo

En Amano, Jordanio, de la 11-a ĝis la 14-a de aprilo 2008 okazis la Unua Mezorienta Kunveno, kun partoprenantoj el Israelo, Jordanio, Dubajo, Turkio kaj Eŭropo. La kunveno okazis en la hotelo Palmyra, kiu troviĝas apud la universitato de Jordanio, kaj ĝin organizis Renato Corsetti el Italio, Hind Hussein el Jordanio kaj Tom Juval el Israelo.

Fakte oni malkovris, ke ne vere temis pri la tut-unua Mezorienta Kunveno de esperantistoj. Tre malproksime en la historio, en la 20-aj jaroj, oni trovas similan provon, sed pri ĝi scias nur historiistoj.

Tion malkovris dudekkvino da partoprenantoj, kiuj aŭskultis prelegojn kaj debatis en hotelo en Amano kaj faris multajn ekskursojn al la vidindaĵoj de Jordanio.

Partoprenis multaj junaj israelaj esperantistoj (la plej granda grupo), arabaj esperantistoj el Jordanio (mi nombris 4 el ili, el kiu kelkaj partoprenis la antaŭan renkontiĝon tie kunlige kun la UK en Telavivo), familio de esperantistoj el alia araba lando, Dubajo, 3 el Turkujo kaj 2 el Eŭropo. Surloke aldoniĝis kelkaj neesperantistaj arabaj knabinoj el Libano, kiuj hazarde malkovris Esperanton kaj volis ricevi la unuajn lecionojn.

La prelegoj temis pri la antaŭaj provoj kunlabori inter esperantistoj en la regiono, pri la araba lingvo (tre klera prezento en Esperanto de Wael Al-mahdi), pri la agado por Esperanto en arablingvaj medioj.

Ĉiuj konsentis, ke ni devas trovi manieron por aktive plinformati pri la jam ekzistantaj retaj kursoj en la araba pere de reklametoj en Google au en ĵurnaloj.

Ĉiuj ankaŭ konsentis, ke ni aranĝu la venont-jaran renkontiĝon pli malpli en la sama printempa tempo en alia lando. Povus temi venontan jaron pri Egiptujo au Turkujo. Tiucela komitateto pluesploras.

Entute la kunveno pasis en tre bela etoso, kiu estis iom malsimila ol tiu de similaj kunvenoj en Eŭropo, tre pli junulara, kun multo da tiu pionira spirito, kiun vi vane serĉas en esperantisme pli malnovaj landoj. La ĉeesto de israelanoj kaj araboj ne vere estis problemo, pro la preteco kompreni la vidpunkton de la aliaj, kiu estas parto de nia esperantlingva kulturo.

La belajoj de la lando (bibliaj lokoj, la Sala Maro/Mortinta Maro

/Senviva Maro, Petra) ankaŭ kontribuis por fari el ĉi tiu unua Mezorienta Kunveno neforgeseblan sperton por la partoprenintoj. Cetere ankoraŭfoje montriĝis ke unu afero estas renkonti sin en la komputila reto kaj unu afero estas renkonti sin kiel vivantaj homoj.

Ankaŭ pro tio oni decidis daŭrigi tiujn kunvenojn, se ni volas restigi la ĉiam pli oftajn esperantistojn, kiujn oni renkontas en la regiono. Oni konstatis, interalie, ke en la golfaj landoj pli kaj pli eklogas eksterlandaj esperantistoj, altirataj de la bonaj labor-kondicoj. Eble por ili iam oni devos arangi ion apartan.

Renato Corsetti
www.liberafolio.org

Rondo Familia

Rondo familia fondiĝis en 1994, la Internacia Jaro de Familio, por ligi esperantistajn familiojn. Ĝi registras familiojn kun aŭ sen infanoj, sendepende de ilia movada engaĝiĝo. Por enskribiĝi, oni anoncu sin ce la Centra Oficejo de UEA.

La organo estas Familia Esperanto (FE), bulteno por kaj pri esperantlingvaj familioj (ekde 2007 rete).

13500 en
lingvofestivalo

La unua Lingva Festivalo en Ĉinio allogis pli ol 13.500 ĉeestantojn, kaj post la angla Esperanto estis la plej populara el la 70 lingvoj prezentitaj kaj instruitaj ĉe la festivalo. Laŭ la direktoro de la festivalo, Dennis Keefe, kredeble estis atingita nova monda rekordo pri kvanto de Esperanto-kursanoj dum unu aranĝo. Al la sukceso de la aranĝo grave kontribuis la nuntempa vicestro de la Fako pri Aplikata Lingvistiko de la Universitato de Nanjing, Cui Jian Hua. Lau sia propono la universitato nun volas dungi instruistojn, kiuj krom sia gepatra lingvo povas aldone instrui Esperanton.

www.liberafolio.org

UEA 100-jara

Universala Esperanto Asocio (UEA) centjariĝis. Skribas la prezidanto de UEA:

Al la esperantistaro

En Ĝenevo, la 28-an de aprilo 1908, Hector Hodler fondis Universalan Esperanto-Asocion. Nek la senmondmilita mondo de la tiama tem-

po, nek la ideo de universaleco, nek la sento de identeco de la esperantistoj restis la samaj ĝis la hodiaŭa tago, en kiu ni, kun ĝojo kaj ankaŭ kun porokaza enpensiĝo, festas la centjariĝon de realaĵo nun ĝenerale rekonata kiel la reprezenta monda Esperanto-organizaĵo.



Mi volus tiun gojon dividi kun vi ĉiuj, kiuj ricevas mian mesaĝon. Indas dividi ankaŭ niajn ĉi-okazajn primeditojn. Historiistoj jam decidis al tiu ĉi jubileo klerigajn intervenojn. Sendube sekvos aliaj kontribuajoj; ni ne perdu ĉi tiun okazon, en kaj ekster la Asocio, rerigardi gian unuan jarcenton, kaj legi kontribuajojn de aliaj por firmigi nian kolektivian konversacion same vigle, kiel ni tion faris okaze de la centjariĝo de la lingvo mem.

Feste salutas
Probal Dasgupta,
Prezidanto

Idris kaj Mama
Afrika

En Italio, Senigallia, okazis la tradicia Internacia Junulara Festivalo, kaj partoprenis la dancisto hip-hopo Idris; kaj la muzikgrupo ("Reggae") Mama Afrika, kiu kantis unu kantaĵon esperante, ambaŭ estis grandan sukceson.

Jorge Tarducci,
www.esperantujo.org

La papo latini-
gis retejon

La 9-an de majo Vatikano publikigis latinan version de sia retejo. Ĝis nun la ampleksa retejo de la papo estis havebla nur en la itala, angla, franca, germana, hispana kaj portugala. La nova latina versio estas tre limigita kompare kun la alilingvaj versioj, kaj aldona al latina Biblio kaj Katekezo ĉefe enhavas tekstojn de paroladoj de la papo. Mankas ankoraŭ la latinlingvaj tekstoj de la tradiciaj kristnaskaj kaj paskaj salutparoladoj, sed ili kredeble aperos, ĉar ili jam estas menciataj en la naviga paĝo.

SOMERA KALENDARO

Västerås

En mångkulturell konsert i Västerås konserthus söndagen den 15 juni kl 16.00.

En gränslös och kommunikativ konsert med många infallsvinklar på bl.a. ryska, ukrainska, tyska, norska, danska, engelska, svenska, dalska, nederländska, polska, indonesiska och naturligtvis esperanto. Språken är många då spelmannen Medhi Martin Strid från Stora Tuna tillsammans med Jomart & Natasa från Hässelby och Kasakstan möter Kaj Stridell från Surahammar samt Kim och Villads Henriksen från Köpenhamn.

Göteborg

Kafejaj somerrenkontiĝoj

Marde 10 junio ekskurso al la fortikajo de Bohus.

Marde 15 julio ekskurso al la botanika gardeno Botaniska trädgården.

Marde 19 aŭgusto vizito al la urba parko Trädgårdsföreningen kaj la kafejo Rosencaféet.

Por ĉiuj kafejrenkontiĝoj, bv vidi la retpagon de la klubejo, esperanto-gbg.org aŭ telefono 031-12 05 94, kiam la dato proksimigas por pli da informoj.

Lesjöfors

Someraj kursoj 6-13 julio. Por pliaj informoj www.esperanto.se > Aktuellt. Telefono de EsperantoGården sur paĝo 2 en La Espero.

Helsingör

Kultura Esperantofestivalo, 12-18 julio. Vidu ĉe kef.saluton.dk

Stockholm

Someraj kafumadoj je 18.00.

4an de Junio. Kafejo Lyran, Ålgrytevägen 90, Mälardalen.

18an de Junio. Kafejo Gröna Stugan, Ursviksvägen 28, Syndbyberg.

2an de Julio. Kafejo Rosendals vårdshus, Rosendalsterassen, Djurgården.

16an de Julio. Kafejo Skanskvarn, apud Gullmarsplan.

30an de Julio. Kafejo Fåfången, Södermalm.

20an de Aŭgusto. Somera ekskurso al Haga Parko, Kupra Tendo kaj Papilioa domo. Kolektiĝo de 12.00 ĉe haltejo Haga södra, aŭtobuso 59 kaj 515.

KONKURSO

Literatura konkurso

"La Ondo de Esperanto" denove invitas ĉiujn partopreni en konkurso Liro-2008, kiu havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio: Pjotr Vjazemskij. "Druzjam"
4. Traduka prozo (el la rusa lingvo): Valerij Brjusov. "Bemolj"
5. Traduka prozo (el la angla): Jack London. "Aloha Oe"

En la branĉoj 1-2 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, abon. jaŝĉik 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 15a de oktobro 2008.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com

Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2011 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en "La Ondo de Esperanto" kaj elektronike.

Legu pli pri Liro <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm> (tie estas ankaŭ la originaloj de la tradukendaj tekstoj),



Kompromita Verda Stelo

En la mondo la verda stelo estas simbolo de la Esperanto-movado. Sed en Pakistano la ministrerio pri naskolimigo ekuzis ĝin kiel sian simbolon. Se nun vi elmetas la verdan stelon, ĉiuj demandas ĉu vi vendas kontraŭkoncipilojn. Mia frato honorigis min pendigante verdan stelon antaŭ sia librovendejo en Ravalpindio. Nun li jam deziras ĝin forigi, ĉar acetantoj petas ĉe li kondomojn kaj kontraŭkoncipilojn.

Saeed Farani, Pakistano

NEKROLOGO

Evert Rausek (1926-2007)

Multfoje Evert montris multajn talentojn dum sia longa membreco en la klube de Malmö. Li aliĝis en 1957. Ĉiam li agadis por subteni ĝin tenante bone multajn klubajn funkciojn kaj solvante multajn praktikajn aferojn. Li ja havis gravajn spertojn el sia profesia laboro. Dank' al Esperanto li akiris amikojn en nia lando kaj ekstere. Fervojoj laboristoj vere aplikis la ideon de la internacia lingvo! Estis ĉiam interese kiam li rakontis pri siaj esperantaj travivaĵoj dum la kunsidoj en nia konversacia grupo. Mi neniam vidis lin sur la dancoplanko, sed dum kopenhaga vizito membrino de KEK laŭdis la Rausekan paron pro la dancolerteco. Bedaŭrinde lia lasta danco okazis tro frue. Li ripozu en paco.

Per-Olov Johansson

Barbro Karlsson (1918-2008)

Vår medlem Barbro Karlsson, Lysekil, gick bort 6 mars, dagen före sin 90-årsdag. Tidigare var hon medlem i Kungälv's esperantoklubb men gick över till vår förening när Kungälv'sklubben lades ner.

Andreas Nordström




Hara Tinkuro

La Xinjiang Regiono de Ĉinio najbaras al Pakistano, tial inter ili multas la ekonomia interfluo. En la merkato de Urumqi (la cefurbo de Xinjiang), oni povas aĉeti produktaĵojn el Pakistano. Sed sur la pakajo de la pakistanaj varoj mankas la uzinstrukcioj en la ĉina lingvo, sed nur tiuj en la angla kaj la urduo, kio kaŭzas problemojn.

Mia koleginino intencis brunigi sian nigran hararon. Ŝi vizitis merkaton kaj aĉetis pakistanan boteloeton. Ŝi petis, ke mi ĉinigu la uzinstrukcion por ke ŝi sciu, kiamaniere oni povas uzu ĝin. Mi prenis la boteloeton kaj legis la klarigon en la angla. Tio estas hara tinkuro, sed.. senharigilo, kiun virinoj uzas por elimini la harojn sur la supra lipo kaj brakoj!

Pri Esperanto en Afriko

Afero de espero. Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko. Heidi Goes. UEA. Rotterdam. 2007. 86 paĝoj.



En la 1980aj jaroj disvastiĝis la Esperanto-movado en Afriko. Multaj Afrikanoj komencis korespondi kun Eŭropanoj. Komencis aperi Afrikanoj en Universalaj Kongresoj. Komencis aperi revuaj artikoloj kaj libretoj en Esperanto, verkitaj de Afrikanoj.

Esperanto tamen havas pli malnovan historion en Afriko ol tio. Jam en 1912 Revuo Esperanto menciis ke UEA havas membrojn en Afriko. Tamen eĉ en 1896 estis esperantistoj en Algerio. Ili kaj multaj el aliaj fruaj Afrikaj esperantistoj estis Eŭropanoj loĝantaj en Afriko, sed baldaŭ komencis esperantistiĝi ankaŭ indiĝenaj Afrikanoj.

En 1962 Karavano de Amikeco kun ok partoprenantoj malsukcese propagandis Esperanton en Afriko. Pli sukcesaj estis en 1983 anoncoj en Tanzania kaj Kenjaj gazetoj, kiuj allogis grandan nombron da informpertoj pri Esperanto.

“Afero de Espero” grandparte estas kolekto de faktoj pri la historio de Esperanto en Afriko. Oni povus deziri pli da analizo pri la evoluo, sed la verko tamen estas pionira kaj tial bonvena.

Leif Nordenstorm

KOREKTLEGANTO BEZONATA

Ĉu vi trovis erarojn en tiu ĉi numero de La Espero?

Se jes, vi eble estus bona korektleganto por estontaj numeroj de La Espero.

Kontaktigu kun la redaktoro se vi volas helpo. La adreson vi trovos sur paĝo 2.

Olimpiaj ludoj

La Olimpiaj ludoj, aŭ Olimpikoj, estas divers-sporta konkuro, kiu okazas ĉiun kvaran jaron. Origine okazigatajn en Olimpio en antikva Grekio, ilin reiniciatis la franca barono Pierre de Coubertin en la fino de la 19-a jarcento. La Ludoj de la Olimpiado, pli bone konataj kiel la someraj Olimpikoj, okazas ĉiun kvaran jaron ekde 1896, kun escepto de la jaroj dum la unua kaj dua mondmilitoj. Speciala versio de Olimpiaj ludoj por vintraj sportoj, nomata la vintraj Olimpikoj, komenciĝis en 1924, sed ekde 1994 tiuj ĉi ludoj ne okazas dum la sama jaro kiel la someraj Olimpikoj.



Sportoj

En la someraj ludoj estas akvosportoj, arkpafado, atletiko, basbalo, biciklado, bokso, futbalo, gazonhokeo, gimnastiko, halterlevo, ĵudo, kanuo kaj kajako, korbopilko, lukto, manpilko, moderna pentatlon, pafado, rajdado, remado, skermo, softbalo, tablotenis, tekvondo, teniso, triatlono, velado, volanludo kaj volejbalo.

En la vintraj ludoj estas arta sketado, biatlono, glaciĥokeo, glitkurado, glitstonludo, luĝo, skiado kaj sportsledo.

Antikvaj ludoj

La Olimpikoj havas longan tradicion. Oni ne plu scias veran originon de la antikvaj Olimpiaj Ludoj, sed estas multaj legendoj pri tiu temo. Unuafoje dokumente menciitaj ili estis en la jaro 776 antaŭ Kristo en Grekio, sed tiuj certe ne estis la unuaj ludoj. Tiutempe ili estis plejparte regiona afero, kun nur unu konkuro, la stadiona kuro (192 m).

Poste aldonigis pliaj konkuroj: tiutempe la sportistoj konkuris pri kurado (longaj kaj mallongaj distancoj), pentatlon (kuro, longosalto, lancoĵeto, diskoĵeto, lukto), pugnobatalo (aŭ pankracio, lukto kaj pugnobatalo) kaj ĉevalvetkuro, pentatlon. Lastan tagon de la evento poetoj kaj filozofoj povis prezenti siajn verkojn kaj ideojn. La lastaj Olimpiaj Ludoj de la antikva epoko okazis en la jaro 393 post

Kristo: La imperiestro Teodozio malpermesis pliajn ludojn pro ilia pagana karaktero.

Modernaj ludoj

La Olimpiaj ludoj de la nuntempo estas iniciatitaj de la barono Pierre de Coubertin, kiu en la jaro 1894 fondis la Internacian Olimpan Komitaton. Laŭ lia idealo la ludoj kunigu sportistojn de ĉiuj popoloj, haŭtkoloroj kaj religioj por konkuri en paca etoso. En la jaro 1896 en Ateno okazis la unuaj Olimpiaj ludoj de la nuntempo (295 viroj el 13 landoj en 42 konkuroj), kaj ekde tiam ili okazas – krom interrompoj pro la mondmilitoj – ĉiun kvaran jaron en malsama loko. Ekde la jaro 1924 ankaŭ vintraj ludoj okazas: unue samjare kiel la someraj ludoj, sed ekde 1994 (pro komercaj kialoj) en dujara alterno kun ili.

Olimpika ĵuro: “Nome de ĉiuj partoprenantoj, mi promesas, ke ni partoprenos en tiuj ĉi Olimpiaj ludoj konsiderante kaj obeante ties validajn regulojn, en la bona spirito de, kaj por la honoro de niaj teamoj.”

Laŭ Vikipedio

EKZERCO

Sportonomoj

Jen alia listo de sportaj terminoj pri olimpiaj kaj neolimpiaj sportoj. Ĉu vi povas traduki la nomojn de tiu ĉi sportoj al la sveda?

Arkopafo | Arta sketado | Atletiko | Aŭtosporto | Basbalo | Biciklado | Boksado | Ĉevalvetkuro | Ĉukpilko | Flugdisko | Flugpilko | Futbalo | Gimnastiko | Glisparaŝuto | Golfo | Grimpado | Halterlevo | Handbalo | Hokeo | Indiako | Ĵudo | Kanada bastonludo | Kanuado | Kegloludo | Konkursa Kolombo | Korbopilko | Korpokulturado | Kroketo | Kurado | Kurlingo | Kvarmurpilko (Skvaŝo) | Luĝo | Lukto | Maratono | Moderna Pentatlon | Motorciklado | Naĝado | Neĝtabulado | Pafado | Peloto | Usona futbalo | Kanada piedpilko | Rajdo | Remo | Flugpilkado (Retpilko) | Rugbeo | Skermo | Skiado | Tablotenis | Taja piedbokso | Teniso | Tekvondo | Triatlono | Velado | Volanludo (Badmintono)

Se vi ne trovas ĉiujn en vortaro: serĉu en www.eo.wikipedia.org